## 4. Konkludaj demandoj

La klasikaj fontoj estas tre svagaj, kontraŭdiraj. Neniu raporto ekzistas de partopreninto. Eĉ de la antaŭaj jaroj la raportoj estas malmultaj. Komparu kun la tre detalaj raportoj, kiujn Cezaro liveris pri *Bellum gallicum* kaj *Bellum civile* enlanda. La unua mencio de *Manilius* estis skribita tri jarojn post la okazo, nur kvar liniojn longa.

La plej ampleksa raporto de *Tacitus* estis skribita pli ol 100 jarojn post la okazo. Ĉu tiu estas vere raporto? Aŭ ĉu nur fantazio? El kiu fonto li fosis? Interesas min, kiel la romianoj ĝenerale traktis raportojn. Ĉu oficialaj raportoj estis devigaj? Kie tiuj estis stokataj? Ĉu ni havas iujn? La raportoj de Cezaro, ĉu ili estis amase kopiitaj? Per kiuj metodoj? Sur kiu materialo? Frape estas, ke la (supre listigitaj) antikvaj aŭtoroj tute ne indikas siajn fontojn.

Ĉu la romianoj ne faris mapojn? Kial ne? Ankaŭ Cezaro, kiu ja estis detalema, nur per vortoj klarigas regionojn kaj vojojn. Se ĉiuj romianoj estis mortigitaj (kiel raportite) kaj *se ne estis* la origina plano de *Varus*, preni la nordan vojon – kie *Germanicus* povu trovi sen mapo la lokon de la batalo? Pri la mon-avido de *Varus*: Ĉu guberniestroj devis raporti al Romo, speciale ankaŭ pri enspezoj kaj elspezoj? Ĉu ili devis sendi monon aŭ aliajn varojn al Romo?

Fakto estas, ke tiu ĉi batal-malvenko estis decida por la fino de la longjaraj klopodoj fare de Romia Imperio pligrandigi la imperion trans la riveron Rejno orienten. **Kaj per tio, la *Varus*-batalo estis larĝaskale decida por la lingva limo inter latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj.**

### Adreso de la aŭtoro

*Hans F.* WELLING
*Zum Ortenbrink 42*
*DE – 49205 H a s b e r g e n* / GERMANIO

<dj4pg@t-online.de>

### Priaŭtora informo

La aŭtoro vivas proksime de *Osnabrück*, ĉirkaŭ 40 km de la loko de la batalo. Li studis elektroteĥnikon kaj informadikon ĉe la Teĥnika Universitato *Aachen* kaj laboris kiel inĝeniero en Eŭropo kaj Azio.





# La kvin Eŭropoj kaj ni

(Ĉu "Eŭropo" sufiĉas?)

*Endre* DUDICH

### Enkonduko

La titolo de jena prelego certe bezonas klarigon. Tuj je la komenco mi devas konstati kaj eldiri: *Eŭropo ne ekzistas*. Tiu eldiro ŝajnas stultaĵo, tamen ĝi estas iasence vero. Nome Eŭropo ne ekzistas kiel konkretaĵo, objektiva realaĵo, sendepende de la homa menso kaj penso, de la mondo de konceptoj kaj konvencioj. Eŭropo tamen ekzistas, kiel abstraktaĵo, koncepto, estigita per interkonsento de homoj, do konvencio. Eŭropo eĉ ne estas unu konvencio, sed (almenaŭ) kvin. Tiuj estas jenaj: *la Eŭropo de la mitologio, de la geografio, de la kulturo, de la politiko, kaj de la ekonomio.*

Kiuj estas **ni?**

Ĉiu homa individuo havas plurajn identecojn. Jen: viro (aŭ virino), junulo, ano de variaj komunumoj kaj grupoj. Ekzemple: esperantisto, instruisto. Do "ni" povas signifi ekzemple "esperantistan junularon". Ĉi tie "ni" estas konsiderata kiel *esperantistoj*. Do la interkrampan subtitolon oni devas interpreti jene: ĉu la kvinobla koncepto de Eŭropo, kaj la el tio sekvantaj rilatoj kaj situacioj, kontentigas nin kiel esperantistojn, aŭ ni celas al io pli?

## UNUA PARTO

### 1. La Eŭropo de la mitologio


En la mitologio de la helenoj (la antikvaj Grekoj) *Evropè* estis fenicia princino, filino de Agenoro, reĝo de la urboŝtato Tiro. Ŝi ekplaĉis al Zeŭso, la estro de la olimpiaj dioj. Li do surprenis la eksteraĵon de virbovo, kaj amindumis ŝin. *Evropè* sidiĝis sur lian dorson, kaj Zeŭso

portis ŝin al la insulo Kreto. Post la fino de tiu unua "eŭropa amafero", la sudokcident-helenia ŝtato "Epeiro" elektis ŝin sia patrona diino. Do Epeiro fakte estas la unua eŭropa ŝtato. Tiu mito esprimas kaj emfazas la okcident-aziajn radikojn de Eŭropo. Tio estas vero, tamen ne la tuta vero, nur unu parto aŭ aspekto de la vero.

## 2. La Eŭropo de la geografio

Kion la lernolibroj pri geografio nomas Eŭropo, fakte estas nur okcidenta duoninsulo de la plej granda kontinento de la planedo Tero, plus aro da insuloj en la najbaraj maroj.

Saĝaj geografoj interkonsentis, ke la orienta limo de Eŭropo estu la kresto de la montaro Uralo, kaj la sudorienta – la kresto de Kaŭkazo. Se oni akceptas tiun konvencion, tiam la plej alta monto de Eŭropo estas ne la Blanka Monto en la Francaj Alpoj (*Mont Blanc*, 4 807 m), sed Elbruso en la suda Rusio (5.642 m). Krome, la geografia Eŭropo ampleksas interalie la insulojn Kreto, Cipro, Malto, eĉ Islandon, kies aparteno al Eŭropo el la geologia vidpunkto estas almenaŭ disputebla. (Ĝia okcidenta parto apartenas al Ameriko.) Aliflanke Gruzio (Kartvelio, Georgio) kaj Armenio estas ne eŭropaj, sed aziaj landoj.




**Bildo 1**: La geografia Eŭropo





## 3. La Eŭropo de la kulturo

Pratempe la variaj popoloj vivantaj en Eŭropo havis diversajn religiojn. La kristana religio originis en Palestino (Judeo kaj Galileo), do ne estas "denaske" eŭropa. Sed post la liberigo kaj sinsekva oficialigo fare de imperiestro Konstanteno la Granda en la 4ª jarcento, kristanismo ekspansiis kune kun la Romia Imperio, eĉ trans ties ĉiamaj limoj. La okcidenta kristanismo estrata de la episkopo de Romo, la papo, transvivis la falon de la Okcident-romia Imperio, eĉ ĝi konkeris la "paganajn" popolojn de Eŭropo. Tiu procezo daŭris ĝis la 14a jarcento, kiam kiel la lastaj ankaŭ la litovoj kristaniĝis.

Intertempe plifortiĝis la konfliktoj inter la papo de Romo kaj la patriarĥo de Konstantinopolo / Bizanco. En la jaro 1054 okazis la t.n. *Granda orienta skismo*: la kristana eklezio de Eŭropo dividiĝis je okcidenta (*katolika*) kaj orienta (*ortodoksa*). Tiu divida limo ekzistas kaj efikas eĉ nuntempe. Sufiĉas citi la militon inter la katolikaj kroatoj kaj la ortodoksaj serboj.

En la 16ª jarcento okazis la t.n. *Granda okcidenta skismo*. La komenca dato estis la jaro 1517, kiam *Martin Luther* defiis la doktrinon kaj la servistojn de la papo Leo X-a (*Giovanni dei Medici*). Sekve, Eŭropo dividiĝis – je la prezo de hontindaj sangaj militoj – je du partoj: la suda *katolika* (papista) kaj la norda (plejparte *protestanta*). Jena divido grave efikis al la historio de Eŭropo. Pere de la kolonizado, kaj pere de la "tutglobiĝo" de la influo de la eŭropa kulturo, eĉ tiun de la tuta Tero. Ĝi "vivas" eĉ nuntempe. Ni citu nur la daŭran konflikton en Norda Irlando inter protestantoj kaj katolikoj, kies veraj kaŭzoj cetere tute ne koncernas la religion, tio estas nur konvena preteksto.

La kontribuo de la *judaismo* al la eŭropa kulturo meritus apartan prelegon, kaj pli kompetentan preleganton. Ni ne forgesu la *Islamon,* la religion de la Korano, kiun okcidente la *araboj* kaj *berberoj*, oriente la *otomanaj turkoj* pere de armiloj portis en Eŭropon. Post ilia definitiva malvenko transvivis kelkaj islam-religiaj grupoj en la neturka Eŭropo. La sanga kazo de la *bosnianoj* estas bone konata kaj bedaŭrata.


La Franca Revolucio (1789) naskis la senreligian Eŭropon. Pli precize, tiam komenciĝis la t.n. *sekularizo*, apartigo de la eklezio kaj la ŝtato, la akra konkurado de variaj ne-religiaj ideologioj, kaj ties lukto

kontraŭ la religioj, precipe kontraŭ la kristana. En la orienta parto de la geografia Eŭropo tio okazis pli malfrue, post la revolucioj de 1917, kaj en la "popolaj demokratioj" post 1948. Tion la pli aĝaj inter ni eĉ tro bone konas, ni tion persone spertis.

## 4. La Eŭropo de la politiko

La tragika unua mondmilito rezultis el la kolapso de kvar imperioj: la aŭstro-hungara, la germana, la rusa kaj la turka. Por multaj intelektuloj tio signifis la finon de Okcidento, aŭ almenaŭ ties "subeniron" (*Otto Spengler*: *Untergang des Abendlandes*, 1926).

Naskiĝis unuflanke la internacia organizo nomita *Ligo de Nacioj*, kaj aliflanke la *Paneŭropa Movado* (grafo *Coudenhove-Kalergi*, 1923). Ekestis diverstipaj diktaturoj (en Rusio, Italio, Germanio, Hispanio kaj Portugalio), kaj la rezulto estis la eĉ pli terura dua mondmilito.




**Bildo 2**: Eŭropo en la 17-a jarcento (R = Reĝlando) post la religia skismo





En la jaro 1946 la tiama ĉefministro de Granda Britio, *Winston Churchill*, en Zuriko (Svislando) proponis krei novan organizaĵon, la *Konsilion de Eŭropo* (*Council of Europe*), kiel kunordigantan organon de la kunlaboro de la okcident-eŭropaj kapitalismaj landoj.

La 5$^{an}$ de majo 1949 en Londono la reprezentantoj de 10 ŝtatoj subskribis la fondan dokumenton de la *Konsilio de Eŭropo:* Belgio, Danio, Francio, Irlando, Italio, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Svedio kaj la Unuiĝinta Reĝlando. Nuntempe la *Konsilio de Eŭropo* havas 43 membrolandojn. Inter ili troviĝas ne nur Rusio (ekde 1996), sed eĉ Kartvelio (Gruzio), Armenio kaj Azer-bajĝano. Do tiu organizo transpasis la sudorientan limon de la geografia Eŭropo...

Jen la ĉefaj karakterizoj de la *Konsilio de Eŭropo:*

- **Celo**: la "pli granda Eŭropo sen dividaj linioj."
- **Devizo / slogano:** "Unueco en diverseco."
- **Funkcio**: esti la "demokratia konscienco de Eŭropo."
- **Oficialaj lingvoj**: la angla kaj la franca. (La Konsilanta Asembleo uzas ankaŭ la germanan kaj la rusan kiel laborlingvojn.)
- **Flago** (ekde 1955): sur mezblua fono 12 flavaj kvinpintaj steloj aranĝitaj cirkle.
- **Himno** (ekde 1972): la *Odo de ĝojo* el la IX$^{a}$ simfonio de *Ludwig van Beethoven.*
- **Rezida urbo**: Strasburgo (Francio)
- **Institucioj**:
  - **Konsilanta Asembleo**: 170 membroj, delegitaj de la parlamentoj de la membrolandoj.
  - **Komisiono de Ministroj**: konsistas el la ministroj pri eksteraj aferoj de la membrolandoj.
  - **Kongreso de Lokaj kaj Regionaj Memregejoj**: havas du Ĉambrojn: tiu de la lokaj memregejoj, kaj tiu de la regionoj
  - **Eŭropa Tribunalo de la Homaj Rajtoj** (ekde 1959).
  - **Sekretario:** ĉirkaŭ 1 6oo anoj.

Kelkaj gravaj **rezolucioj**:

- ❑ 1992: Ĉarto pri la regionaj aŭ minoritataj lingvoj
- ❑ 1995: Skiza akordo pri la protekto de naciaj minoritatoj.
- ❑ 1997: Agadplano, kies ĉefaj temoj estas:

- demokratio kaj la homaj rajtoj,
- socia kohero,
- la sekureco de la civitanoj,
- edukado al demokratio kaj kultura diverseco.

**Buĝeto** (2001): 234 milionoj da € (eŭroj)
**Ĝenerala sekretario**: *Walter Schwimmer* (aŭstro)

## 5. Eŭropo de la ekonomio

### Kroniko de ties evoluado

- En la jaro 1950, la franca ministro pri eksteraj aferoj, *Robert Schumann* proponis, ke la produktado de karbo kaj ŝtalo fare de Francio kaj Germanio estu submetita al komuna instanco.
- Sekvintjare (1951) fakte naskiĝis la *Eŭropa komunumo de karbo kaj ŝtalo,* alinome "*Montan-Unio*".
- La Traktato de Romo (25 de marto 1957) estigis la *Komunan Merkaton*, kaj la *Eŭropan Atomkomunumon* (Euratom).
- La *Eŭropa Komunumo* (EK) ekfunkciis la 1$^{an}$ de januaro 1958 kun ses membrolandoj: Belgio, Francio, Germana Federacia Respubliko, Italio, Luksemburgio kaj Nederlando.
- En 1967 tiuj tri organizoj kunfandiĝis en *Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK).*
- En 1968 oni forigis la internajn doganojn. Tio en principo ebligas la liberan fluon de kapitalo kaj laborforto ene de la "Komuna merkato."
- En 1973 aliĝis Danio, Granda Britio kaj Irlando.
- En 1974 estiĝis la "registaro" de EEK, la *Eŭropa Konsilio*. (Ne konfuzu ĝin kun la *Konsilio de Europo!)*
- En 1979 okazis la unuaj elektoj por la *Eŭropa Parlamento*. En 1981 aliĝis Grekio.
- En 1985 iĝis subskribita la *Unueca Eŭropa Dokumento* etendanta la kunlaboron al la kampoj de medio-protektado kaj teĥnika kooperado.
- Krome oni subskribis la *Akordon de Schengen* pri la malfermo de la landlimoj ene de la Komunumo.
- En 1986 aliĝis Hispanio kaj Portugalio. Ekde tiu jaro ankaŭ la Eŭropa Unio uzas la saman flagon kaj himnon kiel la Konsilio de Eŭropo. Tio kaŭzis multe da miskomprenoj kaj eraroj.





- En 1992 en la nederlanda urbo *Maastricht* estis akceptita la *Kontrakto de Eŭropa Unio.* Tio celas al komuna politiko pri la eksteraj aferoj, pri la vizoj kaj pri sekureco, krome al la enkonduko de komuna valuto ne pli poste ol en 1999.
- En 1992 la *Eŭropa Ekonomia Komunumo* transformiĝis en *Eŭropa Unio.* La du plej gravaj celoj estis starigi dogan-union kaj komunan agrarpolitikon.
- Oni konstatas, ke la Akordo de *Schengen* realiĝis nur parte. *"La membroŝtatoj ne finis la harmoniigon de siaj vizosistemoj, kaj ne finkonstruis la unuecan, schengenan informadan sistemon por alirebligi siajn eksterajn limojn."*
- En 1995 aliĝis Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio. (En Norvegio la popolo voĉdone decidis kontraŭ la aliĝo, fidante je la riĉeco je submara petrolo.)
- Samjare oni akceptis la principojn de plilarĝigo, la *Blankan Libron*, kiu enhavas la programon de preparo, kaj la nomon de la nova, komuna valuto ("Eŭro").
- En 1997 la *Kontrakto de Amsterdamo* fiksis tri ĉefajn celojn:
  - igi la Union pli civitan-amika,
  - fortigi ĝian agadpovon eksteren,
  - igi ĝin pli demokratia kaj (tamen) pli efika.
- En 1998 komenciĝis traktadoj kun 6 landoj (inter ili Hungario) pri aliĝo.
- En 1999 la *Kontrakto de Amsterdamo* ekvalidas.
- En 2000 EU komencis traktadi kun pluaj 6 landoj, kaj proponis partnerecon al Turkio.
- En 2001 iĝis akceptita la *Kontrakto de Nico* (*Nice*) modifanta la decidprocedurojn.
- En 2004, la 1$^{an}$ de majo, efektiviĝis la aliĝo de dek landoj, inter ili Hungario.
- Komence de 2007, Bulgario kaj Rumanio estos akceptataj kiel membrolandoj .
- Rezulte, EU havas nun (2007) entute 27 membroŝtatojn.

Kelkaj karakterizoj de EU:

**Rezida urbo**: Bruselo (Belgio)
**Institucioj:**

- **Konsilio de Ministroj** aŭ **Eŭropa Konsilio**
- **Tribunalo**
- **Parlamento de Eŭropo**

**Oficialaj lingvoj:** laŭprincipe la oficiala lingvo de ĉiu membrolando estas ankaŭ oficiala lingvo de EU. Pri tio rezignis *Irlando*, kaj el la novaj membroj *Malto*. (Ili akceptis uzi la anglan.) Sed la Irlandanoj poste ŝanĝis opinion, do ankaŭ ilia lingvo estis akceptata kiel oficiala lingvo de EU.

## DUA PARTO

### 1. La Eŭropo de la mitologio kaj ni

1.1. Estas inde kaj bele, koni iomete la mitologion de la helenoj. Precipe ĉar ĝuste tiu mito havas gravan kernon de vero. Nome, ke la greka kulturo naskiĝis kaj nutris sin el la fenicia.

1.2. Esperanto, estigita en la 19^a jarcento laŭ raciaj principoj kaj metodoj, tutnature ne posedas propran mitologion. Esperantistoj estas tute liberaj ekkoni kaj ĝui la mitojn de ajna popolo, kaj ne nur de la eŭropaj. Do tiusence ***Eŭropo ne sufiĉas.***

### 2. La Eŭropo de la geografio kaj ni

La lingvo Esperanto naskiĝis en Eŭropo, en la urboj Bjalistoko kaj Varsovio, kie *L.L. Zamenhof* vivis. La gramatika strukturo kaj la baza vortostoko de Esperanto estas esence *hindeŭropa* (latina-ĝermana-slava-greka – jes, ankaŭ greka!). Do tiasence *Esperanto estas eminente eŭropa lingvo.* Tion pleje spertas tiuj homoj, kies gepatra lingvo estas alitipa, ekzemple turkoj, araboj, ĉinoj, japanoj, kaj, ni ne forgesu, ankaŭ la hungaroj.

Sed ni ne devas kontentiĝi pri tio. Se oni konsideras la "*eŭropecon*" de Esperanto en tutmonda perspektivo, *Eŭropo certe ne sufiĉas.* Ĉar se Esperanto iĝus ekzemple oficiala lingvo de Eŭropa Unio, ĝi perdus unu el siaj plej gravaj avantaĝoj, sian *neŭtralecon*. Tio estas grandega defio koncerne ĝian pluan evoluon.

### 3. La Eŭropo de la kulturo kaj ni

Esperanto estas ideologie neŭtrala. Sed ĝia "interna ideo", la *homaranismo*, koincidas kun la doktrino de la t.n. grandaj religioj pri la "universala frateco" de la homoj, pri la homaro kiel "unu granda familio". Tutmonda solidareco – do ***Eŭropo ankaŭ ĉi-rilate ne sufiĉas.***





### 4. La Eŭropo de la politiko kaj ni

Esperantistoj okcident-eŭropaj kreis specialan E-organizon por la EU, nomita EEU, kaj movadon nomitan "*Esperanto – Demokratio – Eŭropo*", batalante por la egalrajteco de ĉiuj lingvoj parolataj en la membroŝtatoj. Kiel ajn estu, Esperanto estas konvena ilo de komunikado kun homoj vivantaj ekster la anlandaro de la Konsilio de Eŭropo, ekzemple kun la *ĉinoj*, kies graveco rapide kaj daŭre kreskas.

### 5. La Eŭropo de la ekonomio kaj ni

La Eŭropa Unio havas proprajn Esperanto-organizaĵojn. En Hungario, esperantistoj serioze kaj diligente klopodas konvinki la kompetentajn instancojn de EU pri tio, ke *Esperanto taŭgas kiel solvo de la lingvaj problemoj de la Eŭropa Unio*, kompreneble ne tuj, sed paŝon post paŝo. Sed tre granda estas la kontraŭstaro, precipe pro kontraŭinteresiteco (ekz. de ĉiuj diplomatoj, tradukistoj kaj interpretistoj).

Do ni bezonas la apogon de UEA kaj de ceteraj ne (nur) eŭropuniaj organizoj. Ni faru mensan eksperimenton. Ni supozu, ke **alvenas la venko:** Esperanto iĝas unu el la oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio. Bonege! Sed per tio Esperanto iomgrade *perdus sian neŭtralecon,* unu el siaj ĉefaj avantaĝoj kaj allogiloj. La unusola ebleco reakiri tion estas, ke Esperanto iĝu ankaŭ unu el la oficialaj lingvoj de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj.

Kaj pro tio, ***Eŭropo evidente ne sufiĉas.***

**Konklude:** ni estas ĉiasence plenrajtaj eŭropanoj, sed ne n u r Eŭropanoj.

**Adreso de la aŭtoro**

*Prof. D-ro DUDICH Endre*
*Károlyi M. u. 14/b*
*HU – 1053 B u d a p e s t* / HUNGARIO
<dudich@t-online.hu>

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro estas doktoro pri geologio, profesoro ĉe Okcidenthungara Universitato. UN-eksperto; honora prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Asocio (HEA); aŭtoro de la esperantlingva scienc-populariga libro "Ĉu vi konas la Teron?" (1983).